

Numero: 243.
Aŭgusto: 2012.

20-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espbel@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Falantaj steloj

En aŭgusta nokto, se ni suprenrigardas al la ĉielo, ofte ni rimarkas brilan stelon flugantan sur la firmamento.

Jam depost jarmiloj la homo admiras ĉi admirindan naturan fenomenon.

Onidire, se ni vidas falantan stelon, tio signifas iu mortis. Ĉiu havas stelon tie supre.

Kompreneble tio estas nur legendo. La fakto estas, ke la terглоbo renkontiĝas kun la meteoraro Perseidoj kaj se nubo ne kovras la firmamenton, tiam la rigardanto povas admiri tiun ĉi eksterordinaran vidindaĵon.

Tamen bone kredi la legendojn. Tio estas praa revo de la homaro. Rigardante la stelaron ni ofte elpensas diversajn historiojn.

Ankaŭ mi ofte cerbumis, kiu estas mia stelo. Estus bone ekkoni ĝin kaj ĝis mi vivas ĉiunokte rigardi ĝin. Eble ĝi flustras al mi la futuron.

En la sekva momento io ekkrias en mi. Ĉu bone, se mi ekscios, kio okazos en la estonto? Ĉu mia vivo estos pli bona?

Multaj homoj deziras ekscii sian estonton. Ili iras al aŭguristo kaj mire ili aŭskultas la magiajn vortojn.

Kiu scias la estonton? Ĉu la steloj diras al ni tion?

Esplorante la estonton, ni tute forgesiĝas pri la nuno.

Laŭ mi en la pasinto kaj nuno tie kaŝiĝas la estonto. De ni dependas, kiel formiĝas la morgaŭa tago. Do, se ni rigardos supren al la ĉielo ni ne forgesiĝu pri nia nuna mondo! Ni provu vivi unu kun la alia pace kaj harmonie, ĉar tiam ankaŭ la estonto estos pli bona.

Tamen ni ne timu eklevi nian kapon kaj esperplene ni rigardu la firmamenton. Inde rigardi la falantajn stelojn, ĉar ni ekkomprenas kiom granda estas la universo kaj kiom etaj ni estas homoj.

Malgraŭ tio homo estas ĝia miraklo. Estaĵo kies animo kaj penso flugas tra galaktoj per lumrapideco. Alvenos tago en la fora estonto, kiam ni homoj ellernos vivi kosme kaj ni fariĝos la civitanoj de la universo.

-Redaktanto-



Helpu al mi!

Helpu al mi! Mi nepre devas ellerni iun mondlingvon. Mi ne scias kiun? Ĉu vi povas helpi al mi? Kiu lingvo estus la plej efika por komprenigi min en la tuta mondo.

Ĉu mi eklernu la anglan? Ŝajnas al mi tio estas bonega ideo.

Kiom da tempon oni bezonas por ellerni tiun ĉi lingvon?

Jes mi komprenas tio dependas de la lernanto. Unu ellernas ĝin rapide, la alia bezonas plurajn jarojn.

Mi devas ellerni iun mondlingvon urĝe. Estus bone, se jam morgaŭ mi sciun ĝin. Jes, jes, mi scias dum unu tago oni ne povas lerni lingvon. Sed mi ne havas eĉ monatojn kaj jarojn por lerni lingvon. Kiu estas tiu lingvo kiun oni povas ellerni rapide kaj facile.

Mi petegas, ne diru tion, ke tia lingvo ne ekzistas. La lingvolernado bezonas jarojn. Jes vi pravas, se mi translokiĝus en tiun landon, kies lingvon mi deziras ellerni.

Mi ne havas monon kaj tempon por pasigi monatojn en fremda lando. Mi deziras lerni lingvon en Hungario.

Bonvolu helpi al mi!

Ĉu tio estas malfacila afero? Ĉu ne ekzistas lingvo, kion oni povas ellerni dum mallonga tempo. Tion mi ege bedaŭras.

Fine mi ne povos lerni fremdan lingvon. Kiu povas helpi al mi? Ne lasu min en duboj. Mia laboro bezonas la konon de iu fremda lingvo.

Kion vi diris? Ĉu vi povas helpi al mi, sed la ellernado de iu nacia lingvo mi bezonas almenaŭ du – tri jarojn por ke mi perfekte sciu ĝin.

Mi jam diris, mi urĝe devas scii iun fremdan lingvon. Mi ne povas atendi longajn jarojn. Mi nun volas scii lingvon.

Kial vi nun nur mansignas? Mi petas vin, ne foriru! Restu! Eble vi konas iun solvon. Ĉu ne? Helpu al mi, amiko! Certe ekzistas lingvo kiu estas ellernebla rapide. Kредu min, mi estas diligenta lingvolernanto. Mi lernos ĝin tage kaj nokte. NE lasu min sola!

Ĉu vi ne povos helpi tiel? Laŭ vi ne ekzistas lingvo, kiu estas ellernebla dum monatoj. Nun vi tre malgajigis min. Kion fari? Mi nepre devas ellerni rapide iun fremdan lingvon. Helpu al mi!

Homoj, kiuj povas helpi al mi? Mi petegas, ne lasu min sola!

-Ŝaŝa-

Pri imaga vojaĝo

-Fantasta rakonto- I.

Mi ne pensis, ke mi alvenos iam tiun ĉi belegan landon. Nun mi rakontas al vi, kiel mi atingis ĝin.

Mi vagadis neniofarante en ŝiphaveno rigardaĉante la gigantajn marŝipojn. Ili estis grandaj kaj elegantaj. Mi ankoraŭ neniam veturis per tiaj akvoveturiloj. Mi nur revadis, en iu tago enŝipiĝi. Sed mi ne havis monon.

Kiel mi diris, mi vagadis en la ŝiphaveno kaj tiam subite el iu ŝipo fremda viro, eble maristo vokis min:

--Halo, amiko! Ĉu vi havas iom da libertempo? Vi devus helpi al mi. Mi petas.

Mi volonte helpis. Kial ne? Ja mi havis tempon. Mi nur promenadis ĉi tie.

La viro alrapidis min kaj klarigis, ke mi devus porti en la ŝipon lignoskatolon kun li. Se mi helpos, tiam mi ricevos je la laboro kvin eŭrojn.

Tio plaĉis al mi. Perlabori kvin eŭrojn per facila laboro estas bona afero. Mi pensis.

La maristo estis forta, bruna viro. Li pipfumis. En la filmoj mi vidis similajn ulojn. Verdire tiam tio ne tro interesis min. Mi antaŭĝojis, ke per facila laboro mi perlaboros kvin eŭrojn.

La lignoskatolo estis sufiĉe malpeza. Mi komencis scivolemadi:

--Kio estas en ĝi?

La respondo estis kruta:

--Tio ne interesu vin. Pli bone, se vi ne scias, kio estas ene.



Mi ne demandadis plu. Kun li mi portis sur la ferdekon la lignoskatolon. Ĝi estis metita tien, kien la maristo diris. Tiam neatendita afero okazis. Antaŭ mi la ĉielo malheliĝis kaj mi sentis iom da doloro en mia kapo. Poste por mi ĉio ĉesiĝis. Kiam mi vekigis mi trovis min en eta, malpura kajuto. En ĝi estis nur litaĉo kun ĉifonitaj kovriloj.

Mi ne sciis, kie mi estas? Mi komencis kriadi kaj frapadi la pordon.

Post longa frapado mi aŭdis, ke iu ekturnas la ŝlosilon kaj la pordo malfermiĝis.

Antaŭ mi ĉe la pordo staris belulino. Mi ege surpiziĝis kaj timeme demandis:

--Kie mi estas?

Ŝi ne respondis, nur ridetis ĉarme. La virino mansignis, ke mi sekvu ŝin.

Mi ne sciis, kien ni iras. Mi sekvis ŝin tra longa koridoro.

Jam estis vespero, ĉar rigardante tra la rondforma fenestreto mi ekvidis en la akvo la spegulbildon de Luno. Krome klariĝis al mi, ke ni estas surmare. la ŝipo ekveturis. Sed mi ne sciis kien? Kien oni veturigas min sen mia konsento? Mi ne komprenis, kial mi estas forrabita. ja mi estas nur simpla homo, kiu promenadis en la ŝiphaveno. Certe oni mise allogis min sur la ferdekon. Espereble baldaŭe mi ekscios la veron.



Mi estis kondukita en brilan salonon. Sur la muroj estis belegaj bildoj pri ĝis nun neviditaj pejzaĝoj. Sur kelkaj bildoj estis videblaj ankaŭ homoj vestitaj en strangaj popolvestaĵoj.

Longe mi atendis tie. La ĉarmulino malaperis kaj diris nenion. Mi atendis kaj atendis. Dume mi ĉirkaŭpromenis la salonon kaj mi havis tempon por rigardi ĉion detale.

Mi ne komprenis kio okazis al vi. Kial mi estas tie ĉi efektive? Ĉu mi estas libera aŭ forrabita? Mil kaj mil demandoj torturis min, sed mi ne ricevis respondon.

Fine mi jam eniĝis kaj serĉis pordon aŭ ian elirejon. Ŝajne la salono ne havis tion, eĉ mi ne trovis la pordon, kie ni envenis kun la belega junulino.

Tio ege ĝenis min.

Ĉu tamen mi estas mallibera, sed tial, kial mi estas en tiu ĉi luksa salono.

Vane mi rigardis trans la rondformaj fenestretoj. Ĉe ĉiu mi vidis nur la malhelan maron, kion Luno prilumis mistere.

Mi jam ne scias kiomfoje ĉirkaŭiris la ejon kaj kiomfoje mi rigardis la bildojn, kiam subite mi ekaŭdis ĉielan orgenmuzikon kaj mi sentis baldaŭe io okazos.

Mi ne eraris, ĉar la vid alvida bele ornamita muro malfermiĝis kaj enpaŝis viro mezaĝa kun barbo kaj en neĝoblanka, longa mantelo. Li estis seriozmiena, sed tre amikema.

Li venis al mi kaj atingante min li ekridetis. Li etendis sian brakon por manpreni. Li havis grandan, fortan manplaton.

Unue mi ektimis de li kaj eble mi ĵetis strangan rigardon al lia direkto.

Tion li rimarkis kaj fariĝis pli amikema, kiam li salutis min:

--Estu salutate surla ferdeko de mia ŝipo!

-daŭrigota-

Poezio

Dankego

Mi ĉiam tre ĝojas, se miaj legantoj apogas min kaj sendas materialojn por Vesperto. Mi petas vin ankaŭ en la estonto estu la kunlaborantoj de Literatura Folio.

Antaŭ nelonge de samideano Benjamen Kraŭs mi ricevis retleteron el Usono kun satira poemo tradukita de li.

Mi dankegas lian kunlaboron kaj ankaŭ en la estonto mi atendos similajn tradukaĵojn eĉ originalajn.

Edward Estlin CUMMINGS

SENTITOLE

"kompreneble post dio usono
mi vin amas ho lando libera
pilgrimlando kaj tiel aldone
ho sej kanju si per la somera
am' okazas jes tiel rapide
kaj ne poste do kial la zorgo
via nomo gloria landide
proklamiĝas per sango per Ĝorgo
per ĝingo per goŝ per gumo kial
priparolu belecon nenio
pli belas ol leonmarŝanti al
la muĝanta buĉado ho dio
ne paŭzante por pensi mortante
anstataŭe ĉŭ haltu l'vokalo
de libero?" li diris trinkante
tre rapide akvon el pokalo.



Poezio

Julia sur Pandaterio 1 de William AULD

Sur ĉi insulo viv' subiras lante.
Dum longaj posttagmezoj morna vento
apud la mar' susura, agitante
al mi la robon kun indiferento,
miajn memorojn frotas, kaj atestas:
Morto, morto, morto... Mort' ne estas.

Edzin' trifoja, nokt-frandinto rava,
kiu la nunon taksis solvalora,
venas al tio ĉi: flutado meva,
paseo vana kaj futuro plora;
virin' malplena palas kiel spirito,
al kiu mankas sang' de oferito.

Kaj mi konstatas en ĉi loko kruda,
kie la karno putros sub la rosoj
fremdaj kaj fridaj, ke la vivo tuta
-- kisoj parfumfrenezaj, vino, rozoj --
ĉiam malplena estis, kaj izola...
Monda reĝin' kadavris ĉiam sola.

Plej sola dum duopoj, sed mi celis
mian feliĉon, kie mi nur povis;
kien sopiro stranga ĉiam pelis,
des pli serĉadis mi, ju pli mi trovis
nur malfeliĉon en la ĝojoj amaj.
Ĉiam surprizis min embuskoj samaj.

Tiu estis alia mi -- nur fablo
aŭdita iam en fremdula revo.
Kion signifas Rom'? Ja nuda sablo,
rokoj, krudmana vent', krianta mevo,
dum mia korpo velkas, apatia,
kaj Romo estas febro fantazia.

Ne plu la nuno gravas. Nun la tempo
estas eterna, sen komenc', sen fino,
kaj mia juna karno pro la trompo
kaj troa martelado de l' destino
ne ardas plu, ne plu al ĝoj' incitas.
Kaj morto mortvivantan min evitas...

Piednoto

¹ Julia, filino de la romia imperiestro Aŭgusto, estis, pro siaj malĉastajoj, ekzilita de la patro en la insulon Pandoterion (aŭ: Pandatarion), hodiaŭ Ventotene, apud la bordo de Kampanio. (Noto de la redakcio).

Por infanoj

Konsilo de la onklo Adalberto por infanoj, kiuj anstataŭ grandaj mondlingvoj elektas Esperanton

Karaj infanoj, nun mi anstataŭ bela fabelo skribas al vi publikan leteron.

Baldaŭ komenciĝos la nova lernejo kaj en la lernejo vi devos lerni fremdan lingvon.

Tio estas bona afero, ĉar scii lingvon estas grandioza. En nia kŭranta mondo oni ne povas ekzisti sen lingvoscio.

Dum kelkaj horoj ni povas atingi malproksimajn mondopartojn aŭ rete komuniki kun diverslingvaj homoj.

Generale en la baz kaj mezlernejoj on instruas la sekvajn mondlingvojn: anglan, germanan, francan, malofte hispanan aŭ iun naciecan lingvon.

Plej multnombre laŭ mi la lernejoj interkonsentante kun la gepatroj elektas la anglan lingvon dirante, ke ĝi estas vaste disvastiginta sur la tergobo.

Ĉu ili pravas? Mi ne scias. Kompreneble lerni kaj scii iun fremdan lingvon estas utile. Mi ne kontraŭas tion, se oni lernas naciajn lingvojn.

Komuniki kun homoj parolantaj diversajn lingvojn estas tre grava kaj necesa.

Tamen estus bone, se Esperanto estus disvastiginta en ĉiu lando, ĉar ĝi povus plifaciligi la lingvlernadon kaj la homoj estus egalrajtaj sur ĉiu tereno.

La gepatroj de tiuj infanoj, kiuj proponas lerni la Zamenhofan lingvon estas saĝaj. Ili antaŭvidas la unusola solvo de tiu ĉi lingva haoso estas la kono de uiversala, sendependa lingvo, kiu estas ellernebla rapide kaj facile.

Karaj infanoj, ne hontu, ke vi lernas kaj scias Esperanton! Mi scias viaj lernejoj kamaradoj eble primokas vin pro tio. Oni ridas pri vi, kial vin interesas la Internacia Lingvo.

Ne forgesu, kiam viaj lernejoj kamaradoj ankoraŭ penadas pri la ellerno de iu eksterordinare malfacila gramatiko aŭ ili timos ekparoli en la lernata lingvo, vi jam flue parolos Esperanton kaj senĝene povos komuniki kun aliaj geesperantistoj ili vivu kie ajn en la tuta mondo.

Do, lerni Esperanton estas grandioza kaj saĝa afero. Kuraĝe uzu kaj progandu ĝin por viaj geamikoj, eĉ iliaj gepatroj.

Ne malesperigu, alvenos tempo, kiam ĝi fariĝos la dua gepatra lingvo de la homaro. Vere nun oni ridas multaj ekaŭdante la vorton Esperanto kaj oni mansignas dubante. Ĉu ankaŭ ĝi estas lingvo?

Jes, Esperanto estas lingvo, kiun oni povas uzi bonege ĉie. Jam nun centmiloj uzas ĝin kaj se vi deziras en ĉiu lando de Tero vi trovas geamikojn. De Usono ĝis Japanio kaj de Svedio ĝis Novzelando vivas geesperantistoj.

La esperantistaro estas granda familio kaj bonega sento scii, ankaŭ mi apartenas al ĝi. Ĉie en la tuta mondo mi estas hejme kaj la geesperantistoj amikeme atendas min.

Kompreneble ankaŭ mi malfermas la pordon de mia domo antaŭ ili. Per la Internacia Lingvo ni ekŝonas unu la alian. Grandaj muroj, eĉ muregoj falas. Malaperas la miskomprenoj kaj lingvaj malfacilaĵoj.

Plu vi ne estos enfermitaj en via nacia lingvo. Por vi ĉiuj la komunikado estas egalrajta. Vi ne sentos vin je dua ranga homo, kiu ne havas lingvon per kiu vi povas komprenigi vin.

Parolu trankvile pri Esperanto al viaj geamikoj kaj lernejoj kamaradoj. Ne timu konvinki vian instruiston aŭ instruiston pri la uiloj de la Zamenhofa lingvo.

Eble iam Esperanto fariĝos la devigita lernobjekto en ĉiu lernejo kaj la infanoj amase lernos ĝin.

Fine, mi petas vin estu fiera pri Esperanto kaj klopodu disvastigi ĝin por ke alvenu la brila, lasta venko kaj ĉiu homo parolu ĝin.

-Onklo Adalberto-



Humoraj bildoj



Humoraj bildoj

